

EKO 2024

TRA LA
MONDO
IRAS FORTA
VOKO

Numero 2024:24; junio 16.

Pezo: Word 40, PDF 220 KB, Sen Ikroĉaĵo de SMG: Sume 260 KB

2024-24

Bonvenon al la 24-a EKO-komuniko de la jaro.

Ni resumu kelkajn okazaĵojn kiuj elstarigas la jaron:

- **La unua Universala Kongreso en Afriko**
- **La unua kongreso de ILEI en Brazilo**
- **Sepdek jaroj depost la triumfo de Monevideo**
- **Dek jaroj de AMO-seminarioj -- jam okazis cent dek**
- **La jaro kun la kvincenta EKO-komuniko**
- **La aperigo de <Landa Parad'> pri tri regionoj**
- **Registro de lokaj grupoj starigita**
- **UEA survojas al nova Strategia Plano**

Komento pri eroj 2 kaj 3: La nuna Kongreso de ILEI ja estas la dua en latin-ameriko. Okazis en Montevideo, Urugvajo la 47-a Kongreso de ILEI en 2014, antaŭ precize dek jaroj. Tiu kongreso memorinde okazis parte en la Nacia Parlamenta Konstruaĵo, kie same okazis la Konferenco de Unesko, kie epokfare la heroo Ivo Lapenna per ruzado sukcesis post la unua malsukceso aprobigi la renoman rezolucion de Unesko favore al Esperanto, kiu depost tiam aperis en la Jarlibro de UEA ĝis la ploriga malapero de ĝi en 2018.

Komento pri ero 6: La tri regionoj traktitaj jam per <Landa Parad'> estas Pacifiko, Afriko kaj MONA (Mez-Oriento kaj Norda Afriko). Post julio sekvos Ameriko, Azio kaj Eŭropo. <Landa Parad'> parte kompensas la pereon de la Jarlibro.

Komento pri ero 7: Traktota en EKO 25 per registrado de lokaj grupoj.

Komento pri ero 8: Vidu la unu-paĝan artikolon de Duncan Charters en la junia revuo *Esperanto* kaj la postan diskutadon.

Potencaj varbhelpiloj el Kanado

Mi preparis tri videojn por diskonigi Esperanton en tri lingvoj. Mi faris la du unuajn por Kanada Esperanto-Asocio kaj la lastan por *Programo Mia Amiko*. Tiuj, kiuj volas, ke mi faru por viaj lingvaj aŭ landaj asocioj, mi pretas fari ilin surbaze de la sama videa stilo. Nepre kontaktu min persone (asalibabr@gmail.com aŭ vacape 5527997474510) por pritrakti la temon.

Jen la anglalingva video: ([angla](#))

Jen la franclingva video: ([franca](#))

Jen portugallingva video: ([portugala](#)).

Adonis Saliba

Virtuala Eo-Forumo en Rusio

La 25-an de majo jam la trian fojon REU okazigis Virtualan Esperanto-Forumon — tutlandan distancan aranĝon, kiu okazis pere de *Zoom*. Ĉi-foje partoprenis ĉirkaŭ 25 personoj, inter kiuj kelkaj eksterlandanoj. Nia gasto el Usono Miko Sloper prelegis pri homaranismo. Sekvis lin la moskvano Nikolao Gudskov, kiu rakontis pri Bulat Okuĝava, kies centjariĝo okazas ĉi-jare. La prelegon garnis per kantoj Mikaelo Povorin. La dagestana aktivulo Abdurahman Junusov rakontis pri la Esperanto-movado en Dagestano kaj invitis al RET-2024, kiu okazos apud Maĥaĉkala aŭguste. Finis la aranĝon per sia prelego Andreo Obrezkov, kiu rakontis pri la muzika grupo *Ekvinokso*.

La programon de la kunveno kompilis Svetlana Smetanina, kiu trovis prelegantojn kaj interkonsentis kun ĉiuj. Dum la aranĝo la kunvenon gvidis Aleksandr Lebedev. La registraĵo de VEF-3 spekteblas en la Jutub-kanalo de REU, jen la ligilo:

<https://youtu.be/-kpz8uoDvZU>


Aleksandr Lebedev, Rusio

La MuzikaKlub kaj Vinilkosmo

Jen la originala komponaĵo *Ŝanĝo de l' sezonoj*, de **Mikel Klav**, ankaŭ kun video. Tiu ĉi kanto

apartenas al la albumo *Realeco*, eldonita de Vinilkosmo:

La bosanovaĵo (*Revante originale Vivo sonhando*), verkita de **Tom Jobim** kaj tradukita de **Flávio Fonseca**.



Refoje pri artefarita inteligento

En EKO 22 vi parolas pri la artefarita inteligento. Jen mia artikolo sur la hejmpaĝo de la Hungaria Eo-Asocio, HEA

<https://esperantohea.hu/esperanto-amiko-chatgpt-la-arta-artefarita-inteligento/>

La paĝo havas jam pli ol 900 vizitintojn kaj espereble legantojn.

István Szabolcs

Forpasis Honora Membro de UEA



Forpasis en junio 2024 en Švėkšna, 96-jaraĝa la plej eminenta nuntempa litova esperantisto Petras Čeliaskas (1929 - 2024). Li estis legenda personeco en Litovio - pedagogo, landesploristo, instruisto, muzeisto, vortaristo, historiisto, tradukisto, redaktoro, verkisto, publicisto, esperantisto. En tiuj terenoj li lasis signifajn spurojn. Kun Esperanto li konatiĝis en 1939. Li tradukis multajn famajn verkojn de la litova literaturo en Esperanton. Dum dek jaroj (1995 - 2005) li estis redaktoro de *Litova stelo*. Li estas aŭtoro de du grandegaj vortaroj (litova-Esperanta- litova), de kelkaj aliaj libroj en Esperanto kaj en la litova lingvo pri Esperanto. Aktive partoprenis pli ol dudek Baltiajn

Esperanto-Tagojn. Li partoprenis ok Universalajn Kongresojn. Ekde 1999 li estis Honora Membro de Universala Esperanto-Asocio. Liaj meritoj por la Litova Esperanto-Movado estas nemezureblaj. Vikipedio en Esperanto pri Petras ČELIAUSKAS https://eo.wikipedia.org/wiki/Petras_%C4%8Celiauskas

Nekrologo aperis ĉe *Ondo de Esperanto*: <https://sezonoj.ru/2024/06/litovio-73/>

Pri justa edukado en la Kongreso de ILEI

En la kadro de la ĉi-jara kongreso de ILEI okazos la 26-an de julio simpozio pri 'Lingvoj de instruado kaj justa edukado'. Jam pretas pluraj prelegantoj ĉeestaj kaj retaj. Enkondukos Ilona Koutny, sed por kompletigi la programon oni serĉas ankoraŭ du prelegantojn pri ĉi tiu temo.

Se vi interesiĝas prelegi rete pri ĝi [la kongreso okazos en Brazilo], bonvolu kontakti min aŭ/kaj Fernando Pita, magisterpita@ce@gmail.com.

Ankoraŭ unu atingo de UK en Aruŝa

"Mi feliĉas, ĉar post diskuto kun la Direktoro pri la edukado en Aruŝo, mi fine ricevis permesilon por instrui Esperanton en ĉiuj ŝtataj mezlernejoj de la urbo. Mi kredas, ke ni iam ricevos ankaŭ permeson por instrui Esperanton tra la tuta nacia teritorio de Tanzanio" anoncis entuziasme John Magessa, unu el la aktivaj fortoj de la LKK de la 109-a UK kaj la ricevinto de la koncerna oficiala atestilo, la 10-an de junio 2024.

Bonvole legu plu ĉe <http://surl.li/ukllh>

Adje Adjévi

Fondaĵo Canuto meritas subtenon

Jen en 2024 la fondaĵo alportis al UEA 675 membrojn (junio 16), grandparte el afrikaj landoj, ĝuste por akceli la eblon por afrikanoj partopreni en la UK en Aruŝa.

Foto: Marjorie Boulton, kato kaj William Auld



Komence de majo 2024, okazis la 104-a Brita Kongreso de Esperanto en la fama universitata urbo Oksfordo. La ĉefa temo de la kongreso estis la vivo kaj verkoj de Marjorie Boulton, kiu studis kaj vivis dum multaj jaroj en tiu renoma urbo. Legu pli en la novaĵretejo *La Ondo de Esperanto*: <https://sezonoj.ru/2024/05/britujo-2/>

===== vortoj: 925 =====

Kunlaborantoj: Rob Moerbeek (NL), Elda Doerfler (IT), Frank Lappe (DE)



La Komuniko iras al la Landaj kaj Fakaj Asocioj, al la Komitato de UEA, pluraj instancoj de ILEI, al la Estraro de TEJO, al unuopuloj, kiuj petis la ricevon kaj la anoj de pluraj pasintaj AMO-

seminarioj. Entute ĉ. 2800 ricevantoj – 1500 rekte plus plusendoj en Hungario, Italio kaj aliaj landoj.

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde. Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Komuniko 1-20 legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: <https://www.ilei.info/agado/EKO.php>

ALDONU AŬ SUBTRAHU VIN: Skribu al <stefan.macgill@e-mail.com>. Por forigo, laŭeble informu min al kiu ekspedo-grupo vi apartenas. Mi povas forigi nur personojn kies retadreso estas individue enskribitaj. Ne eblas forigi homojn, kiuj ricevas la komunikojn pere de retlisto.